

Laborceloj / Laborideoj de la nova internacia fondaĵo Esperanto Internacia

Interna Edukado

- Esperanto-aktivuloj estu edukitaj pri ekz.: gazetara laboro; publika agado; informado kaj marketingo (oni laboru plej profesie), instruado de Esperanto.

Por atingi tion Esperanto Internacia:

- organizu altkvalitajn seminariojn pri Esperanto-informado; gazetara laboro por aktivuloj sur diversaj niveloj;
- kreu filmojn (atingeblaj per la reto) kun seminaria karaktero pri ekz. publikaj rilatoj; grupa agado; instruado de Esperanto, movada organizado;
- liveru necesajn informojn pri la menciitaj temoj sur estonta retpaĝo de Esperanto Internacia;
- preparu literaturan liston en diversaj lingvoj kun bazaj libroj pri temoj, gravaj por Esperanto-aktivuloj (informado, instruado, publikaj rilatoj, financoj, grupdinamiko, psikologio k. a.)
- aranĝu instruseminariojn por plibonigi la pedagogiajn konojn de Esperanto-instruistoj.

Esperanto Informado

- Informoj pri Esperanto montru aktualan uzon kaj praktikon de la lingvo;
- Informoj estu laŭeble plej korektaj; interesitoj ricevu realajn informojn;
- Informa laboro okazu laŭeble sur diversaj kampoj (mikso);

Esperanto Internacia sur la informa kampo:

- kreu aŭ helpu al plibonigo de retpaĝoj por diversaj Esperanto-asocioj, kiuj aspektu laŭeble plej profesie;
- kreu altnivelan informmaterialon en diversaj lingvoj kaj por diversaj regionoj enfokusante sin al tiuj regionoj de la mondo, kiuj ankoraŭ ne disponas pri taŭga materialo kaj kiuj ŝajnas promesplenaj;
- uzu la monderajn teknikojn (interreto)
- provu fari laŭeble modelan gazetan laboron (centra artikolo; uzo de jubileoj ktp.)
- partoprenu ĉe eventoj (speciale: lingvo- aŭ librofoiroj) por informi pri Esperanto (respektive la financaj rimedoj servu por partopreno de lokaj Esperanto-parolantoj ĉe tiaj eventoj);
- provu informi aktive ĵurnalistojn (radio; televido) por atingi ke ili prezentu la fenomenon Esperanto en la amaskomunikiloj;
- Se necesas kunlaboro kun profesiaj agentejoj.

Scienca pritrakto de la afero

Esperanto Internacia:

- instigu al faro de sciencaj esploroj, kiuj agadoj en Esperantujo estis plej sukcesaj kaj kion oni faris ĝuste ĉe tiaj agadoj;
- instigu al faro de strategia esploro pri la temo kie Esperanto havas plej altajn ŝancojn (internaciaj organizaĵoj, regionoj; ŝtatoj);
- instigu al la esploro de la movado laŭ sociologia vidpunkto;
- instigu al la faro de scienca esploro pri la kaŭzoj kial homoj lernas Esperanton;
- instigu al la faro de scienca analizo, kiel plej bone povus funkcii landaj aŭ urbaj Esperanto-organizaĵoj;
- instigu al la faro de scienca esploro kiel atingi ke homoj sukcese trapasas la vojon de lernanto al uzanto de Esperanto kaj kial homoj restas en la movado;
- instigu al merkatanalizo; kiujn servojn ofertu la Esperanto-movado; kiuj servoj estas profitdonaj aŭ povas reporti almenaŭ parton de la investita mono.

Instruado de Esperanto:

- Esperanto Internacia aktive ofertu Esperanto-kurson kontraŭ pago. La kurso estu laŭeble profesinivela kaj la homoj havu la eblecon ricevi instruistan helpon per la modernaj teknikaj rimedoj (Skajpo, telefono)
- Esperanto Internacia provu helpi al lokaj instancoj enkonduki Esperanton speciale en universitataj medioj;
- Esperanto Internacia provu helpi al jam ekzistantaj Esperanto-kursoj;
- aranĝo de instruvojaĝoj.

Teknikoj de instigo:

- Esperanto Internacia uzu la homfortojn ĉe universitatoj aŭ klerigaj institucioj por atingi ke studentoj faru sciencajn laborojn pri Esperanto. Por atingi tion oni faru konkursojn aŭ doni premiojn por sciencaj esploroj bezonataj;
- Esperanto Internacia faru konkursojn ekzemple pri jenaj agadoj:
 - Premio por plej bona gazetartikolo pri Esperanto;
 - Premio por artikoloj en lernejoj aŭ studentaj revuoj;
 - Premio por plej sukcesa loka agado;
 - Premio por plej sukcesa informfilmo pri Esperanto aŭ mencio pri ĝi (en alispecaj filmoj, ekzemple en filmo pri la temo: Kiel pli bone lerni la anglan lingvon aperu informeto pri la propedeŭtika valoro de Esperanto);

- Premio por instrua agado;
- Premio por sukcesa traduka agado (Facebook, turismaj paĝoj kaj simile.
- Pago de stipendioj por plej sukcesaj lernantoj de Esperanto aŭ plej sukcesaj agantoj por Esperanto.

Financoj:

- Esperanto Internacia provu trovi financajn subvenciojn por la diversaj agadoj;
- Ĝi helpu laŭeble al naciaj aŭ lokaj asocioj trovi ŝtatajn subvenciojn;
- Ĝi aktive provu akiri mondonacojn de Esperanto-parolantoj por subtenado de la celoj;
- En sia agado Esperanto Internacia agadu plej ŝpareme kaj per sama monkvanto oni realigu plej multajn agadojn (efikeco).

Ĝeneralaj punktoj:

- Laboro estu laŭeble agrabla por kunlaborantoj;
- Kreo de datenbazo (kune: uzantoj, lernantoj subtenantoj, fakaj organizaĵoj);
- Esperanto Internacia provu ligi simpatiantoj al la organizo por havi la eblecon aktive partoprenigi ilin ĉe interretaj kaj aliaj agadoj;
- Simpatiantoj kaj "amikoj" el malriĉaj landoj havu la eblecon aliĝi senkoste;
- informkanaloj al membroj kaj simpatiantoj estu laŭeble senkostaj (ekz. eldono de retbulteno; retlistoj, uzo de ekzistantaj retpaĝoj kaj revuoj.